

voĉon (certe la voĉon de l' Kuniklo) diranta :  
 "Pat, Pat, kie vi estas, kanajlo ?" kaj responde  
 (de malproksime) jen alia voĉo de ŝi nekonata :  
 "Se plaĉas, Moŝto, jen mi tie ĉi. Mi fosas  
 pomojn."

"Fosas *pomojn* ? Ĉi tien, sencerbulo, kaj  
 eligu min el *ĉi tio*." (Denove aŭdiĝas sonoj de  
 frakasata vitro.)

"Nun, vi diru al mi, Pat, kio tio estas en la  
 fenestro ?"

Brako, Ekscelenco. (Laŭ la akcento per  
 kiu li parolis li certe estis irlandano.)

"Ĉu 'brako' vi diris, stultulo ? Kiu en la  
 tuta mondo iam vidis brakon tiel grandan ? Ĝi  
 ja ŝtopas la tutan fenestron."

"Estas vero, Ekscelenco ; sed, malgraŭ ĉio,  
 ĝi estas brako."

"Nu, ĝi ne devas esti tie, kio ajn ĝi estas.  
 Vi iru tuj kaj forprenu ĝin."

Post tio sekvis longa silento ; nur malofte  
 Alicio aŭdis flustraĵojn : ekze.,

"Mi ne ŝatas ĝin, Moŝto, tut' ne, tut' ne !" kaj  
 "Vi obeu, malkuraĝulo."

En la fino ŝi la duan fojon eletendis la manon  
 kaj faris provkapton en la aero. Ĉi tiun fojon ŝi  
 aŭdis *du* timkriojn, kaj ankaŭ duobligis la sonoj  
 de frakasata vitro. "Tiu kukumejo nepre  
 havas multe da kadroj" pensis Alicio. "Kion  
 oni projektos nun ? Pri la projekto eltiri min

el la fenestro, se nur ili povus  
 kontenta, ĉar mi ja ne volus  
 eterne."

Pasis kelka tempo en plena  
 rompis la silenton rulbruo de  
 vagonradoj, kaj voĉoj ne malmulte  
 ĉiuj kune. Ŝi elaŭdis nur la sek

"Kie la alia ŝtupetaro ?—Mi ja devis alporti  
 Bil alportas—Bilĉo, ĝin starigu tie ĉi—Jen  
 starigu ilin—Ne, ne ! antaŭ ĉio necesas ke  
 atingos la fenestron—Vi ne ĝenu vin, ili  
 Vi, Bil, ekkaptu ĉi tiun ŝnuron—Ĉu la t  
 premon ?—Gardu vin, jen malfiksiĝinta ar  
 falas, gardu la kapojn sube—(Laŭta frak  
 tion ?—Mi kredas ke Bil—Kiu devas deram  
 —Ne, mi ne volas, vi rampu mem—Tion  
 Bil, la mastro ordonas ke vi derampu."

"Do, Bil devas derampi la  
 pensis Alicio. "Ĉiujn malagrablajn  
 al Bil. Mi ne volus esti en la  
 Bil. La fajrujo estas tre mallar  
 ĉio mi nepre sukcesos trafi lin pe  
 eltiris la piedon kiel eble plej  
 atendis ĝis ŝi aŭdis tutapude en  
 gratadon kaj rampadon de iu be  
 ĝi estis, ŝi el la sonoj ne povis  
 dirante al si 'Tio nepre estas Bil'  
 per la piedo en la tubon, kaj at

Unue ŝi aŭdis laŭtan ĥoron :

"Jen Bil tie supre ! Pafiĝis el tubo ! !